


# Esperanto Noord-Nederland

Kara amikoj,


Jen kelkaj informoj pri nia grupo en Nord-Nederlando.

La 16-an de majo ni kunvenis en mia hejmo. Ĉeestis Andries Hovinga, Tian Wei, Wiebren Akkerman, Harm Voortman, Richard Hofman, Johan Swenker kaj mi.

Ni priparolis la pasintan jaron. Ni havis du interesajn projektojn. La projekto Rabbels Hoop, kiun gvidis Lenny Bulthuis kaj la informbudo ĉe la malfermo de la nova Zuiderplantsoen kun Esperanto-tunelo kaj bicikla/promena vojeto.

Ineke montris la en- kaj elspezojn de nia grupo. Ĉio estis en ordo.
Ni decidis ne plu enkasigi membro-kotizon. Nun ankoraŭ estas mono en nia kaso.
Se ni okazigas iun eventon ni povas aparte demandi financan kontribuon al niaj membroj kaj al aliaj esperantistoj, kiuj loĝas en la norda parto de Nederlando.

Post la oficiala parto venis nia gasto sinjorino Lenny Bulthuis. La asocio Esperanto Nederland donis al ŝi la premion Verloren van Themaat pro ŝia projekto Rabbels Hoop.
Ŝi aranĝis bonan programon kun multe da atento pri Esperanto. Ŝi ne povis veni al la jarkunveno de Esperanto Nederland por ricevi la premion. La oficialan dokumenton ŝi ricevis dum tiu ĉi posttagmezo en Groningen.






## Kaftrinkadoj

La venontaj someraj kaftrinkadoj okazos en la restoracio de la Leyhoeve. En tiu ejo nun loĝas nia honora membro Wil van Ganswijk. Ŝi povos facile partopreni la kaftrinkadon!

Ni trinkos kafon dum la mardmatenoj: **la 7-an de julio 2026 kaj la 18-an de aŭgusto 2026, je la 10.30 h.** Eblas lunĉi tie!

La adreso estas Leyhoeve Helperpark 258, 9723 ZA Groningen.
La ejo estas facile atingebla. Aŭtobusoj kaj trajnoj haltas ĉe stacio Eŭropapark, tuj antaŭ la ejo! Parkejo estas proksima, se vi venas per aŭto.

En septembro ni daŭrigas la monatajn kunvenojn en mia hejmo. Datoj sekvas!

## Informbudo

Sabaton, la 27-an de junio ni havos informbudon en la butikcentro Paddepoel. Okazos multkultura foiro. Mi anoncis ke nia grupo deziras havi budon.

Ĉu vi volas kunlabori en tiu ĉi budo? Bona okazo informi la vizitantojn pri nia internacia lingvo! Anoncu vin ĉe mi. Kompreneble vizitantoj estas bonvenaj.




## KULTURA TAGO

La plej freŝa novaĵo estas ke la **Kultura Tago** de la asocio Esperanto Nederland okazos en Wolvega, Frislando! Verŝajne la 5-an de junio 2027! Post Woudrichem, Maastricht, Alkmaar en Veghel nun en la norda parto en Nederlando.

Mi deziras al vi ĉiuj bonan someron. Faru bonajn agrablajn vojaĝojn. Eble ne al foraj landoj, sed ankaŭ Nederlando estas bela. Aŭ promenu au biciklu  tra la Zuiderplantsoen en Groningen kun la Esperanto-strato, tunelo kaj vojaĝeto! Ĉu vi jam vidis ŝildojn kun la nomoj en tiu parko? Fotografu ilin kaj sendu al mi.

Kun koraj salutoj,

Ineke Emmelkamp, sekretario kaj kasisto

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

Tel. 06 – 36087071 aŭ 050-5718842